

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 04/06/2020 Kvarcentokdekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Entute **732,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **287,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **234,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **211,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun preparas Esperantan programon por francoj. (Ekde julio 2020 ?)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde julio 2020 ?)



(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*)

## Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro. 123



Kio ankoraŭ ne montratis, nome kial P.A.G. erare, kaj en aliaj lokoj en la libro, instruas, ke en la Faktitiva Voĉo la precipa funkcio estas "fari ke io aŭ iu estu -a, do igi ia", kiel "Mi beligas la ĝardenon" = "Mi igas la ĝardenon bela". Simile por la Medialo, pri kiu aliparte P.A.G. diras ke la funkcio de-iĝi estas "fari ke io aŭ iu estu -a", kiel en "La ĉambro beliĝas" = "estas bela". Kvankam la diferencoj inter la du malsamaj funkcioj estas malgranda, oni tamen devas koni tiujn diferencojn, kaj agi kiel dezirata.

Por klarigi la diferencojn, jen unue malgranda enkonduko. En normala aktivvoĉa frazo estas malgranda signifodiferenco inter "Tiu floro estas bela" kaj "Tiu floro belas". En la unua frazo oni simple sciigas fakton pri karakteraĵo, kiel en "Mi trovas ke tiuj floroj estas belaj, sed ne la aliaj". Estas nenio pli ol komuniki fakton, la fakton pri la beleco de io. Kaj tiu karakteraĵo agas nevideble. Sed en "Tiu floroj belas" oni sentas ke la beleco aktive agas, kaj faras impreson sur la aŭskultanton. La belado agas, kaj tiu ago estas iom da impreso sur la aŭskultanton, kvankam eble ne fortega, sed iom forta. Tio ĉiam okazas, kiam oni ŝanĝas "esti + adjektivo (aŭ substantivo) al simpla verbo: "Mi estas laca" estas konstato sen pli, kaj "Mi lacas" havas efikon sur nin, ekzemple "tial mi rifuzas nun helpi cin". **Marcel Leereveld.**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

2020-05-28

Kara esperantisto,

AEA invitas vin partopreni nian

**VIRTUALAN TUTTAGAN KONGRESON  
DIMANĈE, LA 7-AN DE JUNIO 2020**

**Kelkaj de ni prezentos, gvidos aŭ distros vin.**

Bonvolu konsideri partopreni aŭ eĉ prezenti ion.

Ĝis nun ni havas la jenajn eksterlandajn gastoj :

**Duncan Charters, Katalin Kovats, JoMo, Renato Corsetti, Keyhan Sayadpour**

**Ni ankaŭ organizas lingvajn klasojn por komencantoj.**

La partopreno estas senkosta. Vi povas partopreni la tutan tagon aŭ elekti nur kelkajn sesiojn.

Sube estas la provizora programo

Por aliĝi sendu mesaĝon al: [prezidanto@esperanto.org.au](mailto:prezidanto@esperanto.org.au)

Amike,

Heather, Indrani, Jonathan, Sandor, Terry

=====

Dear Esperantist,

The Australian Esperanto Association(AEA) is inviting you to join our

**VIRTUAL ALL DAY CONGRESS  
SUNDAY, 7<sup>th</sup> JUNE 2020**

**Some of us will present, guide or entertain you.**

Please consider taking part or even presenting something.

So far, we have the following overseas participants:

**Duncan Charters, Katalin Kovats, JoMo, Renato Corsetti, Keyhan Sayadpour**

We are also organising a few language sessions for beginners.

Participation is free. You can join for the whole day or chose some selected sessions only.

Below is the provisional program

To register send a message to: [prezidanto@esperanto.org.au](mailto:prezidanto@esperanto.org.au)

Cheers,

Heather, Indrani, Jonathan, Sandor, Terry

=====

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# ESPERANTO - VIRTUALA KONGRESO

DIMANĈO, LA 7-A de JUNIO 2020

PROVIZORA PROGRAMO

(Orient-aŭstralia horzono)

08:30 – 09:00	Malferma “ceremonio”, Bonveno, Klarigoj pri la programo
09:00 – 10:00	<b>Esperanto dum KOVIM-19</b> ( <i>Duncan Charters</i> )
10:00 – 10:30	<b>La Enciklopedio de Adam Lindsay Gordon</b> ( <i>John Adams kaj la Torquay Esperanto-Kafoklubo</i> )
10:30 – 11:00	( <i>Katja Steele</i> )
11:00 – 11:30	<b>Kafopaŭzo</b>
11:30 – 12:30	<b>La KOVIM-19 pandemio kaj la sansistemo en Irano</b> ( <i>Keyhan Sayadpour – prezidanto de la Irana Esperanto Asocio</i> )
(06:00 en Irano)	
12:30 – 13:30	<b>Tagmanĝo</b>
13:30 – 14:30	<b>Taglibroj el la Infero: kronikoj de Viktor Klemperer.</b> Klemperer estis judo, kiu mirakle travivis la 12 jarojn de Hitler.
14:30 – 15:30	<b>Montessori edukado</b> ( <i>Penny Vos</i> ) Kio ĝi estas, kaj kiel ĝi prezentas eblecojn kaj por kaj per Esperanto.
15:30 – 16:00	<b>Kafopaŭzo</b>
16:00 – 17:00	<b>Gravaj eroj pri la instruado de Esperanto</b> ( <i>Katalin Kovats</i> )
(08:00 en Belgio)	
17:00 – 18:00	<b>Kiel mi verkas kantojn</b> ( <i>JoMo</i> ) La fama franca kantisto klarigas kiel li verkas kantojn
(09:00 en Francio)	
18:00 – 19:00	<b>Vespermanĝo</b>
19:00 – 20:00	<b>La angla kaj Esperanto</b> ( <i>Renato Corsetti</i> )
(09:00 en Londono)	
20:00 >>>	Neformala babilado



**Estrarkunveno 2020-05-28**



Partoprenis: Sandor, Jonathan, Heather, Terry, Indrani

**(1) ESPERANTO VIRTUALA TAGO – DIMANĈO, la 7-a de junio 2020**

La organizado de la tago progresas.

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Reservu la tagon, metu en vian kalendaron, partoprenu kaj pensu pri mem prezenti ion. Ni ankaŭ proponas lingvajn klasojn

La partopreno estas senpaga.

Se vi volas aliĝi sendu mesaĝon al: [prezidanto@esperanto.org.au](mailto:prezidanto@esperanto.org.au)

La invito kaj la detala programo estas en alia parto de AE kaj ankaŭ aperas en nia retejo: [aea.esperanto.org](http://aea.esperanto.org)

## (2) PROBLEMOJ KUN PAY-PAL

Jonathan kaj Heather solvos ĝin. Preskaŭ solvita.

## (3) MEMORIGO PRI LA NUNAJ VIRTUALAJ KUNVENOJ

La listo de nunaj Esperanto virtualaj kunvenoj en Aŭstralio.

**Brisbano:** Ĉiun duan sabaton, je la 14:00-a (kontakto: [maquinacionescreativas@gmail.com](mailto:maquinacionescreativas@gmail.com))

**Sidenejo:** Sabate, 18:00 -20:00

**Melburno:** Dimanĉe, 19:00 – 19:40 (MeetUp)

**Adelajdo:** Dimanĉe, je 14:00 (Meet Up), (14:30 en Sidenejo, Melburno)  
Ĉiun unuan merkredon de la monato, je la 19:00-a (19:30 Sidenejo)

Bv partopreni kaj kontribui.

Se vi scias aŭ eble eĉ mem organizas virtualajn kunvenojn informu nin.



Venonta kunveno: jaŭdo 11-a de junio 2020.

**Sandor Horvath**



## Korespondpeton de Afriko en Ruando

Mi estas terkulturisto kaj pastoro kaj diskoniganto de Esperanto en Orienta parto de Afriko en Ruando. Mi ŝatus korespondi kun vi rilate Esperanton kaj edukadon se kompreneble vi ankaŭ dezirus ke ni interŝanĝu spertojn ktp.

Kun saluto, DE: **Mana Brinson** <[mana.esperanto.brinson@gmail.com](mailto:mana.esperanto.brinson@gmail.com)>



## Aŭtomata traduko

Mi ofte aŭdis ke aŭtomata traduko estas granda helpo, ke ĝi estas nia estonto. Fakte en Francujo mi foje miris kiam mi vidis azianon tajpi tekston en sia lingvo sur sian inteligentan telefonon, peti de la sistemo tradukon, doni la aparaton al deĵoranto, kiu respondis sammaniere kaj ŝajne ili bone komprenis unu la alian. Kiam mi ricevas tekston en la korea lingvo kun ebleco aliri al tuja angligado, la rezulto estas tia:

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

"These intellectuals make my voice I have to support and support them. Broken soil recovering the self .It will need nature time to grow in a good jayangbun but the republic I don't know if I should start again to make a field with the soil of the deep-based on the pollution of pollution and the pollution of the pollution."



Plie mi estas petita juĝi la tradukon kaj doni al ĝi poentojn , kion mi tute ne povas fari ĉar mi bezonas scii kiom for de la originala teksto tiu traduko estas. Mi dum pluraj jaroj atendis plibonigon de la ilo , sed ĝis nun mi nur malesperas pro la senutileco de la servo.

Kia estas via sperto en tiu sfero?

**Franciska Toubale**

이런 지식인들이 제 목소리를 내고  
나는 이들을 지지하고 응원해야 한다.  
망가진 토양이 자생력을 회복하고  
좋은 자양분 속에 작물이 자라는데는 자연의  
시간이 필요하겠지만 공화국은  
충과 균과의 공생의 단계를 넘어 경반층까지  
오염의 심각하기에 심토의 흙을 끄집어 내어 밭  
만들기를 어찌면 다시 시작해야 할지 모른다.

Aŭtomata traduko per Google

Ĉi tiuj intelektuloj aŭdas mian voĉon  
Mi devas subteni kaj subteni ilin.  
La damaĝita grundo restarigos sian  
naturan forton  
Necesas natura tempo, ke la rikoltoj  
kreskas kun bona nutrado, sed la  
respubliko  
Ĉar ĝi grave gravas poluadon preter  
la stadio de simbiozo kun la fungo kaj  
la fungo, eble necesas remalfermi la  
kampon elprenante grundon el la  
grundo. ???



## Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

**Roger Springer**




# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Junio 2020 n-ro: 54

<file:///C:/Users/User/AppData/Local/Microsoft/Windows/INetCache/Content.Outlook/MV1EZ Y29/Turka-Stelo-054%20-%202020.06.pdf>



Ĉu la protestoj en USONO daŭras ĉar 40 milionoj da homoj perdis siajn laborpostenojn kaj la registaro ne vere helpas ilin? **Roger Springer**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Ĉu vi elektas politikistojn por prizorgi Aŭstralion aŭ por ke ili enmiksiĝu en fremdajn aferojn, eĉ se la decidoj faritaj ne estas advantaĝaj al Aŭstralio? **Roger**

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)



## Viraj kaj inaj floroj en mia ĝardeno

### VIRAJ KAJ INAJ VESTAĴOJ.

En la tempo de mia knabeco, en la dudekaj jaroj de la antaŭa jarcento, virinoj ne povis surhavi virajn vestaĵojn kaj viroj ne povis surmeti inajn vestaĵojn. Oni striktis pri tio, kaj neobeanto ne havus facilan vivon. Ĝis iu momento kiam la strataj prostituinoj, (nestrataj tre malmultis) decidis vesti sin per viraj pantalonoj. Ili ja jam havis malbonan reputacion, kaj unu plia ne gravus al ili. Sed la sekvantan jaron la riĉaj junaj virinoj komencis imiti la prostituinojn kaj komencis vesti sin per viraj pantalonoj. Post tio, sed malrapide, la ordinaraj junaj virinoj komencis imiti la riĉajn. Sammaniere la prostituinoj enkondukis aliajn virajn vestaĵojn. Viraj prostituuloj tiutempe ne, aŭ preskaŭ ne, ekzistis, kaj do novaj specoj de vestoj ne enkondukiĝis inter la viroj, kaj ili plu devis vesti sin per viraj vestaĵoj. Kiel rezulto eĉ nun oni ne vidas virojn surhavantajn inajn vestaĵojn, kaj tiu tabuo restas.

Aliflanke mi devas diri, ke viraj vestaĵoj ofte pli praktikas por virinoj, dum inaj vestaĵoj ne pli praktikas por viroj, escepte se oni estas en la skota aŭ greka armeo. Kaj eĉ tie nur limige. Tamen ekzistas kelkaj viroj kiuj arte ŝatas kelkajn virinajn vestaĵojn, sed pro la tabuo ne kuraĝas surhavi ilin. Ĉe virinoj, kontraŭe, estas emo ŝati arte la virajn vestaĵojn, precipe ĉar tio donas al ili la senton de potenco kiun la viroj ankoraŭ havas sur la virinojn en la nuna okcidenta socio.

Do oni akceptas virinojn surhavantajn virajn sportŝuojn (*runners*) kaj sensplittrikjakojn (*windcheaters*) kaj virajn bluzojn, dum la viroj ne rajtas surhavi virinajn vestaĵojn, eĉ se ili arte ŝatas tiujn. Kaj krom la natura sekstransvestado de la transseksuloj (*transgenders*), ekzistas, kvankam malmultaj, kelkaj aliseksemuloj (*heterosexuals*) kiuj arte ŝatas kaj dezirus surhavi inajn vestaĵojn. Ilia ŝato ŝajnas nenormala, kaj estas, same kiel la ŝatoj de Mikelanĝelo kaj Einstein estas nenormalaj. Multaj homoj ne komprenas la arton de Vangogh, kaj mi kaj aliaj ne komprenas la arton de virinaj vestaĵoj. Sed malakcepti tiun arton estas aĉa seksismo, simila al la malpermeso de la arto de Vangogh, kiel unu konata arthistoriisto brita proponis. Tiuj kelkaj amantoj de virinaj vestaĵoj ŝatas la inajn vestaĵojn ne pro tio kiujn partojn de la virina korpo ili kovras, sed pro la formo de la vestaĵoj. Ŝajnas al mi, ke tia arta interesiĝo komencis disvolviĝi en la knaba aĝo, antaŭ la aĝo de dek jaroj, post kiam la vestaĵoj markas la sekson de la persono.

**Marcel Leereveld.**

### ĈU KOMO ĈU NE ?

Pri la uzo de la lingvaj signoj Zamenhof diris: “Uzu ilin en Esperanto kiel vi uzas ilin en via etna lingvo”. La plejmulto de la signoj uzatas egale en la diversaj etnaj lingvoj (kvankam la

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

svedoj devas ŝanĝi la uzon de sia “ ; “), sed la uzo de la komo iomete malsamas. Dum neangloj uzas ĝin antaŭ ĉiu suborda frazo, la angla lingvo indikas ekstran signifon al ĝi: se la suborda frazo estas necesa, ili ne uzas la komon, kaj se ĝi estas nenecesa, oni uzas la komon. Jen ekzemploj:

Mi havas du fratojn: “Mia frato kiu loĝas en Sidneo vizitos min dimanĉe.” = necesa.

Mi havas unu fraton: “Mia frato, kiu loĝas en Sidneo, vizitos min dimanĉe.” = nenecesa.

“Mi rompis akcidente la du glasojn kiuj staris sur la hejtilo, ne la aliajn” = necesa.

“Mi rompis akcidente la du glasojn, kiuj staris sur la hejtilo (ne estis aliaj glasoj)” = nenecesa.

Ĉar aliaj eŭropaj lingvoj ne faras tiun diferencon en la skribita lingvo, ili ne povas indiki la diferencajn signifojn. Sed en la parola lingvo ili per la tono faras la diferencon same kiel la angloj.

Por fari la diferencon en la parola lingvo, vidu la artikolon “Elektaj kaj aldonaj atribuoj” en mia gramatiklibro “Lingvaj Resondoj”.

Marcel Leereveld.



## Mi lernas pri la vivo

Mi lernas la hungaran pere de Duolingo. Certe eduka sperto, eĉ se mi grumbas pri rigideco rilate al alternativaj respondoj egalsignifaj. Se la maŝino decidas, ke iu staras *by* la fenestro, kaj mi skribas *near*, mi dentogrincige akceptas la amaran verdikton.

Sed ne kredu, ke mi lernas nur novan lingvon. Ho ne! Mi ricevas tiom da inspiro pri novaj vivospertoj. Mi citu kelkajn ekzemplojn:

*La tridek sep grekaj inĝenieroj ternas malantaŭ la domo.* Bone, ke iu ĉeestis por ilin nombri, ĉu ne? Kaj en la epoko de la virusa pesto estas bone, ke tiuj ternantoj estu malantaŭ la domo.

*La sepdeknaŭa ĉina kuiristo kuris al la flughaveno, ne la okdeka.* Refoje tiu mirinda precizeco pri nombroj. Certe ĉinoj estas strangaj homoj, se iliaj kuiristoj ariĝas tiel multnombre kaj kuras al flughavenoj. Aŭ ĉu temas pri nur unu strangulo? Aŭ eble li volis trafi la lastan flugon hejmen, antaŭ ol la landlimoj estos fermitaj?

*Nek leonoj nek araneoj estas insektoj.* Kiu povintus antaŭscii tion?

*Mi ŝteleniras la ĉambron malantaŭ la bela juna infanĝardeno instruistino.* Embarasas min, ke oni malkovras la erotikajn pekojn de mia junaĝo, sed nun mi scias diri tion en ankoraŭ alia lingvo.

*La fiŝoj en tiu rivero tre similas al ŝarkoj: ili estas grandaj kaj timoveke teruraj.* Do tie mi ne naĝos, alia utila konsilo.

*La kvardek du japanaj flegistinoj kuras tien, kie estas la usonaj advokatoj.* Ŝajne estas granda manko de edziĝkandidatoj en Japanio. Sed usonaj advokatoj? Hm, pri gustoj oni ne disputu.

*Ni havas nur tre forte harkovritajn katojn.* Refoje ni ne diskutu pri gustoj.

**Se informo pri via novaĝo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Ĉiuj volas kisi mian amikinon. Ŝajnas, ke mi devas forĉasi la ceterajn homojn, se mi ne volas perdi ŝin.

Dudek kvin homoj dancas sur la tegmento. Kio? Ni esperu, ke la tegmento estas firme rezista: katastrofo ŝajnas proksima ...

La blatoj venis ne el mia ĉambro, sed el tiu de la kvin komponistoj. Mi ĉiam suspektis, ke komponistoj estas iom malpuraj homoj.

Mi amas ŝin kaj atendas ŝin. Mi esperas, ke liaj intencoj estas bonaj ...

Li saltas ĉiutage en la bankuvon. Dio mia, mi esperas, ke estas granda bankuvo!

Dek unu viroj ne iris tra la pordo, sed grimpis tra la fenestro. Ĉu ĉiuj kune aŭ unuope?

La viroj, kiuj perdis siajn ĉapelojn, ekstaras de malantaŭ la tablo, sub kiu ne estas tapiŝo aŭ kato. Eble la ĉapeloj estas sub la tablo?

La bela juna infanĝardeno instruistino duŝas sin ne en la banĉambro sed ekstere en la ĝardeno. Mi esperas, ke mi sukcesos trovi tiun ĝardenon ...

Vidu, per Duolingo oni lernas pli ol lingvon!

Trevor Steele



Hodiaŭ miaj belaj trioĵ de orkideoj floras

Petro Danzer



**3ZZZ** . Mi ree devas peti senkulpigon de la aŭskultantoj, kiuj vive aŭskultas nian elsendon. Komence de la elsendo de la 1a de junio 2020 ili aŭdis BBC kanalon , ĉar pro kialo, kiun la administranto ne menciis , nia programo ne estis en la sistemo .Post telefonvoko envenis la planita programo.



En ĝi estas pli da informoj pri kronviruso ,inkluzive en alia landoj ,kaj se vi ŝatas legi la librojn de Trevor Steele, la intervjuo de Pawel Fisher-Kotowski konatigos al vi la lastajn verkojn de tiu verkabunda verkisto .

Franciska Toubale

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**